Ni legis

el recenzo de Nikolao GUDSKOV

La libro prezentas ion mezan inter taglibro kaj rememoroj pri vojaĝo de nederlanda esperantisto Gerrit Berveling, kiu partoprenis en aŭdaca kaj iom masoĥisma karavano de 20 esperantistoj el eŭropaj landoj al la 92-a UK en Jokohamo. Kial masoĥisma? Ĉar, laŭ mia imago, veturi en trajno pli ol unu, ekstremokaze du tagnoktoj estas teruega afero, kaj tiuj aŭdaculoj decidis atingi Japanion plejparte per trajno, …

Gerrit BERVELING
Vojaĝimpresoj tra Siberio kaj Japanio
Fonto, Brazilo, 2008, 144 p. Havebla ĉe LG.

el letero de Sen RODIN

Leginte la du unuajn ĉapitrojn de via libro, mi komprenas: *Kaj kiu pravas* estas – kiel vi prave diris – "instrua" libro. Ĝi trejnas la leganton rezoni racie, serĉi la radikojn de konvinkoj kaj kondutoj antaŭe blinde akceptataj kvazaŭ naturaj, memkompreneblaj, nediskutindaj. Vi estas 'ekzistad-filozofo' kies verkojn nutras longa pripensado, abunda legado, neordinara kono de verkoj far tutmondaj aŭtoroj. Via verko distingiĝas pro ekvilibro, objektiveco, serena pritaksado de homoj, teorioj, historiaj eventoj, manko de antaŭjuĝoj. Raraj estas tiaj verkoj. En Italio…



Eugène DE ZILAH
Kaj kiu pravas ...
Pro Esperanto, Vieno, 2002, 360 p. Havebla ĉe LG.